



La Voĉo de Kilimanĝaro

Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto

Festparolado de la Prezidanto de UEA



Asubuhi Njema! Karibu! Good morning and welcome! Bonjour, tout le monde!

Bonan matenon kaj elkoran bonvenon al la 109-a Universala Kongreso de Esperanto kun nia ĉeftemo: *Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo.*

Estimataj distingitaj gastoj, karaj gekongresanoj:

Antaŭ jardekoj, por-Esperanta ĉampiono Tibor Sekelj alvokis por Kongreso de Universala Esperanto-Asocio en la Afrika kontinento. Antaŭaj Estraroj de UEA priparolis, promesis, deziris sekvi la iniciatojn de ILEI kaj TEJO, instruistoj kaj gejunuloj, kiam ili unufoje kongresis en la kontinento. Sed fine jen ni estas en Aruŝo, en nature bela Tanzanio, kun mondfamaj okazoj por vizitoj al muzeoj de lokaj kulturaj atingoj, sopirate inspiraj montoj kiel Kilimanĝaro, respektoplena observado kaj konservado de bestoj vivantaj en ilia natura ĉirkaŭaĵo: ĝuanta Kongreson en vere digna internacia kongresejo.

Kial decidis veni UEA? Ekde nia unua renkontiĝo en Bulonjo en 1905 ni neniam kongresis en via kontinento, do tiu momento devis veni. Koincide kun laŭdinda pliaktiviĝo de Afrika agado, kaj estraraniĝo de burundano Jérémie Sabiyumva, eblis ne nur pripensi sed aktive progressi al la celo okazigi la unuan afrikan UK-on.

La historio ne favoris al la kontinento kie kaj originis la homaro, kaj kie montriĝis pintoj de homa kompato kaj konduto. La natura amo kaj amikeco kiun ni jam ĉiuj spertis ekde nia alteriĝo en Tanzanio spegulas altan senton de tiuj universalaj valoroj al kiuj strebas ankaŭ nia komunumo de parolantoj de Esperanto.

En pluraj afrikaj vilaĝoj okaze de miskonduto de komunumano, eĉ perforta, la solvo de la vilaĝanoj estis kunsidi por individue voĉigi la bonajn kvalitojn kiujn ili vidis en ties karaktero. Post diskuto pri la neakceptebla konduto, se la individuo publike pentus kaj pretus ricevi helpon, akceptiĝus ties profunda pardonpeto, kaj la tuta komunumo akceptus la reintegrigon de la komunumano. En Sieraleono, tio nomiĝas *Fambul Tok*, familia interparolado. Nur se la individuo rifuzus, la vilaĝanoj kun granda bedaŭro postulus forlason de la komunumo.

Pripensu tiun ekzemplon de paca, senpuna solvado de

konflikto, bazita sur la koncepto ke ĉiu individuo estas valora, kaj pro tio meritas ne kondamnon, karceron aŭ mortigon, sed amon, komprenemon, kaj senkondiĉan helpon al ties daŭra kontribuo, kaj reintegrigo en la socion.

Ĉu la idealoj sur kiuj baziĝis tiu konduto ne sukcesus elimini miskomprenojn, antaŭjuĝojn, diskriminacion, militadon en la tuta homa socio?

Pri lingva diskriminacio, devigoj paroli en eks-koloniaj lingvoj ne liberigas. Respekto al ĉiuj lokaj kaj regionaj lingvoj jes, kiel montris la komuna akcepto de la suhila aldone al la dekoj da lingvoj en ĉi tiu lando. Nia D-ro Zamenhof spertis en sia hejmurbo Bjalistoko la lingvo-konfliktojn kaj miskomprenon kiujn okazigis disdivido de la socio laŭ parolantoj de ĝiaj diversaj lingvoj. Nur negativa estis perforta altrudo de lingvo de superuloj. Lia ideo estis krei socie kaj politike neŭtralan lingvon, relative facile lerneblan pro ĝia reguleco. Ne unu plia fremda lingvo, sed volonte alprenita, natura kromkomunikilo por transkulturaj kontaktoj. Ni konstatas nun ke lia revo venkis, komplete kaj nekontesteble, en la funkciado de Esperanto en la moderna mondo de teknikaj antaŭensaltoj. Dekmiloj da edukaj kaj literaturaj verkoj, dekmiloj da ĉiutagaj retaj kaj videaj kontaktoj, atestas ne nur la validecon de la koncepto, sed ĝian jaman realigon.

De kio dependas la agnosko de tiu elprovita, plej logika, plej efika solvo? De ni, la tiel nomataj esperantistoj. Kiel insistis mia unua lernejestro, la mondo bezonas internacian lingvon. Ĝi ekzistas, ĝia nomo estas Esperanto. Bedaŭrinde la esperantistoj nenion faras por antaŭenigi ĝin. Ĉu tio estas priskribo de ni, aŭ ĉu ni akceptas la defion vidigi la mirindan vizon de D-ro Zamenhof al mondo ĝin bezonanta ĉiam pli, kiam konfliktoj minacas mondan pacon kaj eĉ daŭripovon de la homa socio?

Kio necesas? D-ro Zamenhof avertis ke ni laboru sincere kaj ĉiam en konkordo, do kongrue kun niaj idealoj. Li sincere kredis ke se ni plenumus tiun antaŭkondiĉon, nenio barus la finan akcepton de nia ideo. En ĉi tiu Kongreso, ni atentis ankaŭ aliajn kolonojn de nia strategia laborplano: informado, instruado, kaj rilatoj kun la ekstera mondo. Kaj ni plifortigos per niaj komisionoj kaj fokusitaj laborgrupoj la veran celatingon de nia lingvo, donaci por la nova generacio aŭtentan, nature terglo-ban interkomprenigilon.

Ni ĵus finis mirinde sukcesan tritagon 2-an Kongreson de la Esperanta Virina Asocio de Afriko, en lando kies prezidento estas la unua virino okupanta tiun oficon, la respektata Mama Samia Suluhu Hassan. Ŝi levis la standardon de koruptolibera servado, kaj la rajtoj de virinoj esti respektataj kiel neniel malpli kompetentaj kaj meritplenaj ol viroj. Kaj ne nur tio, en la Kongresa rezolucio de EVAA reliefigas la konstato ke kiuj iniciatas militojn ne estas virinoj. Ilia paca, amema zorgo de siaj familioj kaj kreskanta gvidado en la socio estos kernaj por realigi niajn pacajn celojn. En nia movado ni bezonas ilian amon, konfliktsolvemon, naturan akcepton de diverseco kaj ĝojan elmontron de senkolizia vivĝuo. Ne nur per lerta, amikema komunikado, sed ankaŭ per ĝoja kantado kaj dancado, kiel ni spertos en ĉi tiu Kongreso.

La Esperanta idealo neniam havis komercan celon. Tamen kiel montriĝis nia renkontiĝo de virinoj, ĝi povas servi por kapabligi ĉiujn perlabori la vivon per trejniĝo por uzo de iliaj talentoj; forigi plastajn materialojn aŭ recikli ilin kreante belajn vendeblajn ornamaĵojn; plifortigi reciprokan kunhelpemon; instigi al prepariĝo por gvidado en la socio; kaj doni servojn al la mondo per la praktika, ĉiutage aplikata uzado de nia lingvo. Al profesia internacie vojaĝanta prelegisto iu iam demandis: vi iras al Afriko por instrui al la afrikanoj kiel pli bone vivi, ĉu ne? La respondo: ne, sinjorino, mi iras al Afriko por lerni kiel ni plibonigu niajn vivojn! Kaj jen ni estas, por reciproke lerni respekti la diversecon de niaj kutimoj kaj kontribuoj. Vi eĉ havas en viaj sakoj interkulturan gvidilon kiun ni ĉiuj profitu. Kaj fine, ni kune pruvu ke Esperanto donas al ni kaj al nia tergloblo tiun profundan pliriĉiĝon kiu enkondukos novan mondon de aŭtenta kompreno.

Do dankante la laboregon de nia Kongresa Fako kaj la Loka Kongresa Komitato, kaj ĉiuj niaj kunlaborantoj, ni lernu, ĝuu kaj refortiĝu por nia rolo kiel pacaj batalantoj por la pli ĵusta, efika komunikado kiun bezonas nia mondo pli ol iam ajn antaŭe. Koran dankon.

Duncan Charters

Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

Avizo pri programŝanĝo

La IKU-prelego "Astrofiziko por Laikoj" de Amri Wandel reokazos ĵaŭdon, 8.8, je la 11-a. Inter 11-11:40 okazos la unua parto, kaj inter 11:40-12:20 la dua parto, inkluzive de AIS-ekzameneto. Ĉiuj partoprenantoj ricevos AIS-ateston. La materialo por la dua parto aperas nur en la kolora libreto "Astrofiziko por Laikoj" kiu haveblas en la Libroservo.

Kontribuu al la Voĉo de Kilimanĝaro per sendo de artikoloj aŭ fotoj al arusha.kuriero@gmail.com aŭ venu enmanigi vian kontribuon al la redaktoro en la ĉambro SB-25 ĉe Simba hall – en tiu VIP-loko.

La 46-a Esperantologia Konferenco

Ĵaŭdon, 2024-08-08, Salono Lala (K222)

09.00 – 09.30 Gvidanto: Bengt-Arne WICKSTRÖM

Malfermo: bonvenigo kaj mallonga prezento de CED, Informilo por interlingvistoj / *Information for interlinguists, Esperantologio / Esperanto studies kaj LPLP – Language problems and language planning*

09.30 – 10.30 Gvidanto: Bengt-Arne WICKSTRÖM

Unua sesio: **Socio- kaj interlingvistiko en Afriko**

Heidi GOES, Belgio

La Esperanto-movado en Afriko: iom da historio
surloke

Mireille GROSJEAN, Svislando

Afrika bunteco ne nur en faŭno kaj flaŭro, sed ankaŭ en lingvoj
surloke

10.30 – 11.00 Kafo

11.00 – 12.30 Gvidanto: Heidi GOES

Dua sesio: **Afrikaj lingvoj kaj Esperanto**

Renato CORSETTI, Italio/Britio

Hic sunt leones: pri la ĵus eldonita vortaro Haŭsa-Esperanto kaj pri la neceso pri esploroj kaj komparoj kun Esperanto de la lingvoj de okcidenta Afriko
surloke

Daniel MAXWELL, Usono

Komparo inter Esperanto kaj la svahila
surloke

Élisée BYELONGO ISHELOKE, DR Kongo

Kiel la svahila kaj Esperanto estu uzitaj por la paco en orienta Afriko
surloke

12.30 – 14.00 Tagmanĝo

14.00 – 15.00 Gvidanto: Renato CORSETTI

Tria sesio: **Gravaj homoj en Esperantujo**

Ilona KOUTNY, Pollando/Hungario

La rolo de István Szerdahelyi en la interlingvistiko kaj esperantologio
rete

Alessandra MADELLA, Italio/Ĉinio

La rilatoj de Cicio Mar kun angla-lingvaj literaturaj medioj en la tridekaj kaj kvardekaj jaroj
rete

15.00 – 16.30 Gvidanto: Daniel MAXWELL

Kvara sesio: **Evoluo kaj uzo de Esperanto**

Philippe PLANCHON, Francio
Evoluo kaj funkciado de la memstara uzo de afiksoj en Esperanto
rete

Kristin TYTGAT, Belgio
La Internacia Asocio de Policistoj kaj Esperanto
surloke

Ilona KOUTNY, Hungario/Pollando
De socia plurlingvismo kaj komuna lingvo ĝis plurligveco de esperantistoj
rete

16.30 – 16.45 Kafo

16.45– 17.30 Gvidanto: Bengt-Arne WICKSTRÖM

Kvina sesio: **Ĝenerala diskuto pri la futuro de Esperanto en Afriko**

Enkondukoj de
Adjévi ADJÉ, Togolando
Alexandrine OMBA, DR Kongo

sekvotaj de komentarioj de ĉiuj partoprenantoj.
surloke.

Chinua Achebe en Esperanto

La romano "Aferoj disfalas" (Things Fall Apart) de Chinua Achebe estas klasikaĵo de la afrika literaturo. Ĝi tre leginde kaj vigle prezentas la vivon en vilaĝo de la nuntempa Niĝerio ĉirkaŭ la komenco de la 20-a jarcento. La alveno de eŭropaj misiistoj detruas tiun tradicion vivomanieron kaj dividas la komunumon. Tiu grava verko estas ĵus fintradukita de Anna Lowenstein, kun enkonduko de Elisée Byelongo. Anna prezentos sian tradukon dum Aŭtoraj Duonhoraj vendredon je 9.15 - 9.45 en la salono Ĉeliauskas.

Aŭtoraj duonhoraj hodiaŭ

13:30-14:30: Gbadamassi Latifou, *Kock*
13:30-14:15: Renato Corsetti, *Ĉeliauskas*

Raporto pri la kunsido de Oomoto



La 1-a kunsido de Oomoto okazis de la 16-a kaj kvarono ĝis la 18-a en la 5-a de aŭgusto kun ĉirkaŭ 50 ĉeestantoj. Antaŭ la komenco la muziko de du-korda kotoo Jakumo-kotoo (muzikilo) bonvenigis ĉeestantojn. D-ro Karlo ROWE transdonis malferman saluton. Post voĉlego el sankta libro de Oomoto Diaj Revelacioj fare de s-ro ŜIBATA Satomi kaj ĉinkon-meditado gvidita de s-ro OKUŬAKI Toŝiomi, la ĝenerala sekretario de EPA (Esperanto-Populariga Asocio: la satelita organizo de Oomoto pri Esperanto), d-ro ROWE parolis pri la kongresa temo anstataŭ s-ro TABUĈI Jasuo, kiu ne povis ĉeesti pro trafika akcidento. Sekvis kantado de Gloro el ambonaj kantoj verkitaj de Kunfondinto de Oomoto, DEGUĈI Onisaburo. Poste estis filma paŭzo. Du filmetoj pri Miroku-danco kaj Utafesto estis prezentitaj. En la malantaŭa parto de la kunsido, s-ro OKUŬAKI raportis pri la 100-jara Memorevento de la Fondiĝo de EPA okazigita septembre pasintjare kaj invitis ĉeestantojn al Utafesto en 2025. Sekvis reala ĉantado de Esperanta utao. Kaj s-ro Roman Dobrzynski el Pollando parolis pri sia rilato kun Oomoto. Krome, ĉiuj ĝuis la dancon de Miroku kaj fine s-ro DEGUĈI Micugi prezentis la ferman saluton.

OKUUXAKI Tosxiomi

Kongresteme....

La kongresa temo: **"Lingvo, homo kaj medio por plibona mondo"**.

Ĉie en la mondo la medio, en kiu vivas la homoj, estas minacata de la agadoj de la homo.

Tiu problemo ne estas hodiaŭa, sed ĝi jam ekzistas de multaj jaroj. La homo devas trovi solvon por plibonigi la medion... kaj la mondon.

Por pace solvi necesas, ke homoj parolu komunan lingvon en kulturo celanta interkompreniĝon.

La lingvo estas la bazo de komunikado inter la homoj kaj unu el la esprimoj de la homaj kulturoj. Samtempe fortigante la lokajn lingvojn, diversloke en la mondo minoritatigitaj kaj minacataj, necesas antaŭenigi la uzadon de komuna neŭtrala lingvo por ĵusta kaj demokratia interkomunikado.

Ro. Sartoro

Humphrey Tonkin: kion fari?

Karaj kongresanoj,

En mia mesaĝo al la inaŭguro de la kongreso mi esprimis mian esperon pri interkompreniĝo kaj reciproka konfido – la vera morala fundamento de Esperanto. Kiel via reprezentanto al Unuiĝintaj Nacioj, mi estas tre konscia pri la fortoj kiuj subfosas la pacon en la mondo, la konfidon, la kunlaboron inter homoj de bona volo, kaj la respekton de diverseco.

La homaro hodiaŭ havas sciencajn kapablojn kiujn ĝi tute ne havis kiam Zamenhof unue revis pri mondo de malferma komunikado kiu ebligu kunlaboron je senprecedenca skalo. Sed tiuj kapabloj estas tro ofte uzataj egoisme: unu lando konkurencas kontraŭ aliaj; iuj landoj formas aliancojn nur por ekskludi aliajn; iuj landoj arigas riĉaĵojn por ke la aliaj restu malriĉaj. Kaj la homoj interbatalas.

Ekzistas, tamen, homoj kiuj laboras por paco kaj prospero. Sed ili estas tro malmultaj.

Kiam Unuiĝintaj Nacioj lanĉis sian grandan programon de Celoj por Daŭripova Evoluigo en la jaro 2015, ĝi tion faris surbaze de la relative sukcesaj sed pli modestaj Jarmilaj Evoluigaj Celoj. Ni certe povus argumenti, ke, sen la ekzisto de la Celoj por Daŭripova Evoluigo, ni ne atingus la progreson kiun ni jam atingis – sed plejparte evidentas, ke tiu progreso ne sufiĉas. Ni ne sukcesos atingi la Celojn por Daŭripova Evoluigo ĝustatempe, se entute, sen plena sindediĉo al tiu tasko.

Male, la nombro de rifuĝintoj en la mondo kreskis al senprecedencaj 120 milionoj da homoj; la nombro kaj feroco de militoj kreskas en diversaj partoj de la mondo; la monda temperaturo gradon post grado kreskas; specioj estingiĝas; pandemioj minacas; ni dronas en vasta maro da rubaĵoj.

Kion fari?

Ni esperantistoj laboras por paco, laboras por plena kompreno, laboras por forigi militojn per la konstato, ke oni ne militas kontraŭ tiuj kiuj estas oniaj amikoj.

Ni daŭrigu tiel. Pli ol iam ajn antaŭe, la mondo bezonas unuecan lingvon por plenumi unuecajn celojn. Esperanto floru inter la bunta lingva diverseco de la mondo – floru kiel unuiga forto de respekto kaj tutmonda kunlaboro.

Mi sola estas senpotenca; vi sola estas senpotenca. Sed kune ni povas krei pacan kaj prosperan mondon.

Humphrey Tonkin
Honora Prezidanto de UEA

Raporto pri antaŭkongreso (sekvo)

Nenio preparis nin al tiu nekredebla sperto: renkontiĝo kun ennaturaj homoj apenaŭ tuŝantaj la civilizacion. Hadzoj vivas en kaj de la naturo, ni eble eĉ diru por la naturo. Ili varme akceptis nin, informis pri siaj vivmanieroj pere de iu tribano parolanta la anglan. Antaŭ ol ni sekvis ilin al la ĉasado, ili elmontris kaj klarigis kun impresaj krioj kaj gestoj la diversajn sagojn, ties utilon kaj celon. Vana estis la ĉasado – verŝajne pro tiom da bruemaj partoprenantoj, sed sekvis la demonstrado de elfosado de sovaĝaj terpomoj, kiujn ili tre simple gustumigis al ni kaj krudaj, kaj iom kuirataj sur tuj ekflamigita fajreto antaŭ niaj scivolemaj okuloj. Ni ankaŭ elprovis iliajn arkojn, pli-mapli trafante kelkajn starigitajn celtabulojn. Imagu, ke ili vivas sen elektro, do sen la multnombraj aparatoj, kiuj ŝajnas al ni ne malhaveblaj! Ili dormas surgrunde, kvazaŭ sen ajna ŝirmilo. La akvo, malofta, servas nur al trinkado kaj kuirado, ne al lavado(!). Rilate la vivplezurojn ili ŝajnas emi fumadi tabakon k.s. La infanoj ne frekventas la lernejojn; la lingvo estas nur parola. La mortintojn ili enlasas iom flanke en la tero kun kelkaj ŝtonoj por marki la lokon. Tiuj ĉi reiros al sia kara naturo por eterna ciklo. La Hadzoj havas kelkajn kontaktojn kun aliaj proksimuloj por interŝanĝi varojn, kiujn ili ne produktas, kiel metalaĵojn por la sagopintoj. La virinoj zorgas pri la infanoj, la manĝoj kaj la starigo de kabanetoj el fajnaj pajloj. Ili migras ĉiun sesan monaton por trapasi la vintron en grotoj. Entute ni ekkonatiĝis kun gento kvazaŭ prahistoria, aparta al la moderna vivo. Tamen ili estas afablaj homoj ridantaj kaj ŝajne feliĉaj.



Elizabet Le Dru, KN 324

*Sekvo kaj fino de la raporto aperos en unu el la venontaj Kurieroj.

Sciigo kaj kondolenco



Forpasis dum la 109-a UK la japana e-isto s-ro Moriwaki Yasumasa (KN359) ĝenerala sekretario de Kjuŝua Ligo, en sia hotelo en Tanzanio. S-ro Moriwaki suferis pro kronika malsano. Li venis kun akompananto, s-ro Yoshihiro Ikeda, komentanto.

La UEA-komunumo kondolencas lian familion kaj la japanan e-istaron. La organizantoj subtenas proksimulojn pri traktado kun tanzaniaj instancoj kaj la japanan ambasado.

S-ro Moriwaki partoprenis la antaŭkongresan ekskurson AK1. Li estas tiu en rulseĝo.